

Karakterizoj de la porinfana literaturo svisa

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-822/290, 1979 julio 12 kaj 14

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-42/SRI-1979-42-B-5-290-822-1979-07-12-14-Claude-kaj-Andree-Gacond-Karakterizoj-de-la-porinfana-literaturo-svisa.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Ni konkludas hodiaŭ serion de kvar prelegoj pri la porinfana literaturo kaj pri la karakterizoj, kiujn ili akiris en Svislando. Fine de nia pasintsemajna prezento ni menciis, ke krom la fideleco en la priskribo de pejzaĝoj kaj de personoj kaj la ŝato realisma de detaloj, tiun ĉi literaturon karakterizas kelkaj temoj. Ili estas la ideo de libereco, la nocio de demokrata vivo kaj la emo al harmonia familia vivo. Unuavide tiuj abstraktaj nocioj ne ŝajnas tre inspirigaj por verkistoj kaj ilustristoj. Ili tamen naskis tutan serion da veraj ĉefverkoj, kiujn tre ŝatas la infanoj.

A.- La ideo de libereco ekzemple karakterizas la verkon "Flurina und das Wildvöglein" aŭ "Catherine et l'oiseau sauvage" (Flurina kaj la sovaĝa birdeto) de Alois Carigiet. La sovaĝa birdo, kiun trovis Flurina ne eltenas la kaptitecon. En la bildlibro "Wie die Tiere den Zoo verliessen" (Kiel la bestoj forlasis la zoologian ĝardenon) de Pascale Allamand ĉiuj estaĵoj elektas la liberecon; la kuniketo "Petit Brun" (brunuleto) de Jörg Müller preferas la danĝerojn de la naturo al la sekureco de la kunikla bredejo en "Die Kanincheninsel" aŭ "L'île aux lapins" (La kunikla insulo).

Cl.- La nocio de demokratio aŭ de la helveta kutimo kune prizorgi la vivaferojn esprimiĝas diversmaniere en multaj porinfanaj verkoj. En "Der Geburtstag" (La naskiĝfestoj) de Hans Fischer la bestoj en unuanima kunlaboro pretigas grandan feston por marki la naskiĝtagon de Lisette; en "Der goldene Apfel" (la ora pomo) de Celestino Piatti la bestoj organizas kunvenon por kune diskuti kaj decidi kion fari pri la ora pomo.

A.- Fine ni diris ke la familio kaj la familia harmonio estas alia temo ofte renkontata en la porinfana literaturo svisa. En la verkoj de la grizonano Alois Carigiet abundas la familiaj scenoj. La heroo Pitschi de Hans Fischer retrovas la sekurecon inter la bestoj, kiuj formas grandan familion, post la plenumiĝo de siaj stultaĵoj. Alia heroo, la Peppino de Sita Jucker esprimas la profundan deziron malkovri veran familian vivon. En "Stadtmaus und Landmaus" (urba muso kaj kamparana muso) de Ruth Huerlimann du musoj malsamdevenaj serĉadas harmonian geedzan vivon, tio en humurplena fresketo.

Cl.- La porinfana literaturo estas ofte viktimo de manieroj. Tamen la plej bonaj bildlibroj supervenkas la modfluojn, ofte pro la talento de la ilustristoj. Tiuj libroj fariĝas iom post iom daŭre reeldonataj klasikaĵoj ŝatataj de la plenkreskuloj kaj de la infanoj. Ni ne forgesu la fundamentan rolon de la plenkreskuloj: estas ili, kiuj aĉetas la librojn, kaj ne la infanoj mem.

A.- Inter la svisaj ilustristoj, kiuj fariĝis klasikuloj, ni remenciu la grizonanon, Alois Carigiet, naskita en Truns, en 1902, Hans Fischer, naskita en Bern, 1909, mortinta en Interlaken en 1958). Li estas konata kiel ilustristo de fe-rakontoj, interalie de tiuj de Grimm kaj Perrault. Hodiaŭ Jörg Müller (Lausanne, 1942), kiu vivas en Biel/Bienne, fariĝis la plej ŝatata porinfana pentristo. "Der Bär, der ein Bär bleiben Wollte" aŭ "Un ours, je suis pourtant un ours" (La urso, kiu volis resti urso) kaj "Die Kanincheninsel" aŭ "L'île aux lapins" (La kunikla

insulo) alŝorĉas la infanojn kaj la plenkreskulojn pro sia realismo naturalisma kaj siaj meditigaj pejzaĝoj.

Cl.- La pentraĵ-serioj "Alle Jahre wieder saust der Presslufthammer" aŭ "La ronde des marteaux piqueurs" kaj "Hier fällt ein Haus, dort steht ein Kran" aŭ "La pelle mécanique ou la mutation d'une ville", kiuj rakontas la iompostioman modernigon de urbokvartalo kaj la iompostioman urbiĝon de kamparana regiono, ŝorĉas la observemon de la rigardantoj ĉiuaĝaj kaj nepre vekas ĉe ili reagojn, negativajn aŭ pozitivajn. Neniu povas resti sen reago antaŭ la bildoj de Jörg Müller, bildoj mesaĝplenaj kaj rigardinvitaj.

A.- Ĉiuj tiuj artistoj, kiujn ni hodiaŭ menciis, malgraŭ evidentaj esprimdiferencoj atestas en sia arto la saman ŝaton de la detaloj, la identan sentemon al kreo de aparta etoso kaj ĉefe grandan postulon en la bildokomponado. Nenio estas improvizita. Tiujn karakterizaĵojn oni ofte retrovas ĉe la svisaj pentristoj por plenkreskuloj.

Cl.- Estas interese menci, ke tre ĝenerale la svisaj ilustristoj de porinfanaj bildlibroj estas reklamaj grafikistoj. Tamen unu el la klasikuloj, Felix Hoffmann, la ilustristo de la Grimm-rakontoj, ne sekvis la tradician formadon. Li kreis al si tre personan stilon utiligante preskaŭ ekskluzive la litografan teknikon por la reprodukto de siaj ekstertempaj pentraĵoj popolfabelemaj.

A.- Ŝajnas, ke la nova generacio de ilustristoj iel provas emancipiĝi de la tradicia svisa realismo enkondukante, kiel Paul Nussbaumer aŭ Sita Jucker, kolorojn pli simbolajn aŭ eĉ trovante sian inspiron en la novaj artaj tendencoj internaciaj, kiel la surrealismo, la fotorealismo, la manierismo, la punktismo, la naivismo aŭ la papergluado.

Cl.- En decembro 1973, la porinfanaj bibliotekoĵ de la urbo La Chaux-de-Fonds, por marki sian dudekkvinan jaron, pretigis tre belan ekspozicion pri la svisaj ilustristoj de porinfanaj bildlibroj. Tiu ĉi ekspozicio estis vera revelacio. Ĝi malkovrigis al vasta publiko la riĉecon de pentroarto ofte supraĵe konsiderata fare de la artrecenzistoj. Kiel la reklama arto, la porinfana arto ne estas arto por arto. La vizitantoj de la ekspozicio pri la porinfanaj bildlibroj nur povis eksenti, ke tamen ili troviĝas antaŭ ne neglektenda arta tendenco. Nuntempe tiu ĉi ekspozicio komencis migradi tra Svislando. Ni tre esperas, ke ĝi devigos la muzeestrojn ekkonsideri tiun ĉi arton, kiel ili devus ekkonsideri la reklaman arton, kiam ili aĉetas novajn pentraĵojn por la modernartaj salonoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia, kiu konkludis prelegserion pri la porinfana literaturo en Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!